

Eble vi jam vidis la novan paghon pri tutmondaj temoj - indas alklaki la butonojn, ekzemple:

<https://verdularo.com/ave-informas/> (dankon al Michael)

2021-2030 UN-dekjaroj por restaurado de ekosistemoj: <https://www.decadeonrestoration.org/>

Por ECI (Europa civitana Iniciativo) necesas 1.000.000 da subskriboj el minimume 7 diversaj EU-landoj; kolektenda ene de 12 monatoj. Tamen indas subskribi rapide, por atingi la kvanton sufiche frue.

Bazajn informojn en Esperanto pri ECI vi trovos en vikipedio - kaj de tie estas ligoj por legi detale en 18 lingvoj. [https://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa\\_civitana\\_iniciato](https://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_civitana_iniciato)

= = =

### 2021-12-21 **Heghoj kaj solulaj arboj kaj agrikulturo**

Jen ekzemplo de pozitiva agado de kamparanoj kune kun ekologiuloj. Ghenerale la strukturo de kampoj en Europo tendencas al monokulturado, pro ekonomiaj kauzoj. Bedaurinde la Komuna Agrar-Politiko de EU nur iomete subtenas ekologio-afablan agrikulturon (inkluzive arbaroj, vitejoj, lagoj kaj maroj).

Tiu bona ekzemplo okazas en la regiono de Freiburg, sud-okcidenta Germanio, proksime de Francio kaj Svisio:

Carola Holweg kolektas monon por subteni kelkajn kamparanojn kiuj pretas planti au re-planti heghojn; au lasi solulajn/izolitajn arbojn ene de sia kampo kaj prizorgas ilin. Estas kopiinda ekzemplo, kiu subtenas la minacatan biodiversecon.

Bedaurinde ekzistas obstakla formalajho kiu detenas kamparanojn fari tiajn re-naturigojn: Post 5 jaroj tiaj heghoj ricevos statuson de naturobjekto, kaj poste oni ne rajtas formeti ilin - au estas malfacile.

Tio signifas, ke la ekonomia valoro de tiu kampo malaltighas. Do, kaj tial indas kompensi la kamparanojn se ili re-donas terenon al la naturo favore al pli alta biodiverseco. Heghoj ankau plibonigas regionan mikroklimaton, bremsas ventojn, tenas humidecon, reduktas temperaturon.

La aktuala celo estas 2400 Euro; ankoraŭ necesas 500 post mia malgranda subteno; jen la ligilo al la germana amas-fundajho EcoCrowd, kiu subtenas ekologio-afablajn projektojn:

<https://www.ecocrowd.de/projekte/ackerbaum-und-hecke-pflanze-rette/>

--

### 2021-12-11 **Armeoj poluas la mondon**

En LMD de Decembro estas granda artikolo kiaj poluadoj okazas flanke de usona armeo, kio restos longan tempon en la regionoj; ech se la misio tie jam finighis. Ene de Usono la EPA (medio-protektada administracio) kontrolas; sed tio ne okazas ekster Usono. Krome tro ofte la situacio en tiaj regionoj dum longa tempo restas malstabila, t.s. ke la registaroj tie ne havas la kapaciton purigi (se eblas) la poluitan terenon. Temas unuflanke pri la aero (gigantaj kvantoj da CO<sub>2</sub>, kaj fulgo) kiuj jam estas eligitaj, sed ofte temas pri kemiajhoj kiuj poluas la grundon kaj grundakvon: ekz-e poli-fluritaj molekuloj (PFAS)\* kiujn oni uzis por estingi fajrojn; malrichigita uranio de obusoj, nafto.

\*) En rivero 11 km post Ramstein (usona bazo en Germanio) oni mezuris 500-oblan super la limito koncentritecon da PFAS.

<https://umwelt-militaer.org/us-air-base-ramstein-altlasten/>

en la angla: [http://info.umwelt-militaer.org/pdf/2021/2021-01\\_PFAS\\_engl\\_Web.pdf](http://info.umwelt-militaer.org/pdf/2021/2021-01_PFAS_engl_Web.pdf)

Certe chiuj armeoj eligas CO<sub>2</sub>, poluas la medion. Fakte tia poluado estas nur unu plia argumento kontraŭ tiu arhaika maniero solvi problemojn.

= =

### 2021-12-05 **Salmo - nedaurigebla maniero bredi salmojn**

Filmo videbla ghis la 8a de Decembro !

Char de la sovagha salmo ne estas sufiche multnombra, oni bredas la salomon en granda kvanto. Sed chi-tiu maniero havas gravajn problemojn:

- Salmo metas siajn ovojn en montaraj riveretoj, kaj de tiu migras en la oceanon; post pluraj jaroj ghi revenas en la saman rivereton por demeti siajn ovojn.

- Malgranda parto de kulturitaj salmoj povas elnaghi el la bredejo, ghi povas miksighi kun la natura kaj tiel la kvalito de la sovagha salmo malbonighas.

- La salmo estas chas-besto, sed en la bredejo oni nutras ilin chefe pere de sojo, aldonas malmulte da fish-faruno, koloron kaj medikamentojn.
- Char la bredado okazas en nenaturaj amasoj, la higienaj kondiĉoj estas tute diversaj kaj necesas medikamentoj.
- Sojo venas i.a. el la amazonia pluvbaro - char la salmo-ekonomio etendiĝas oni devas kulturi pli da sojo.
- Norvegio eksportas salmon en la tutan mondon, ekonomio de multaj miljardoj.
- Ili ankaŭ bredas salmojn je bordoj de la Pacifiko, ekzemple en Chilio (en la regiono de Chiloe).
- Simile kun la malapero de insektoj kaj papilioj ankaŭ la sovagha salmo malaperas pli-kaj-pli. Pro la salmo-pedikoj kiuj troviĝas en la bredo-kaghoj - ankaŭ la junaj salmidoj estas atakataj de tiuj pedikoj, char ili devas preterpasi la kaghojn.
- En Francio - la salmo naghis/loghis en la Loire kaj alfluejoj.

Sed ankaŭ estas espero :

- En la limregiono inter Germanio kaj Francio - je la supra Rejno, je la rivereto Murg (proksime de Iffezheim kaj Baden-Baden) fishistoj kultivas la sovaghan salmon kaj lasas la fishidojn al sia longa vojagho. La diversaj kluzoj - kaj akvo-turbino-instalajhoj - laŭlonge de la Rejno kaj la alfluantaj riveretoj (kiel la Murg) estas prilaboritaj, tiel ke la fishoj povas migri en ambau direktoj. Kaj la akvokvalito intertempe estas sufiĉe bone.
- En Laerdal, Norvegio, estas muzeo pri la sovagha salmo por lerni kiel protekti la salmon.
- En Norvegio oni nun komencis bredi salmon ekstere de maro, en fermitaj cirkulado-instalajhoj. Tiel ne estas endanĝerigo de la sovaghaj salmoj, sed tamen necesas produkti nutrajhon por la salmoj.

En la franca kaj germana videbla ghis 8a de Decembro 2021 !

<https://www.arte.tv/de/videos/085430-000-A/die-gier-nach-lachs/>

En tiu filmo vi vidas kripligitajn kaj malsanajn salmojn en bredejo.

= =

### 2021-12 **Marchoj povas savi la klimaton - kaj subteni kamparanojn**

dum la lastaj 300 jaroj la homaro utiligis marchojn chefe pere de for-fluigo de la akvo; sekigo, uzado de la torfo por hejti kaj pli poste por plifaciligi la kulturadon de plantoj.

Intertempe ni scias, ke per tiu sekigado, samtempe la stokigita karbono en la torfo rapide brulighas (ech sen flamoj) kaj eligas CO2.

Aliflanke la grandaj marchoj havas grandan kapaciton teni pluvakvon kaj redoni ghin malrapide.

Dank' al la fosajhoj pluvakvo pli rapide povas eliri el tia regiono kaj plenigi riverojn ghis inundoj.

Nuntempe esploristoj kaj verd-partia politiko klopodas re-akvigi la marchojn kaj tamen utiligi ghin por la agrikulturo; t.n. paludikulturo. Adicie oni povas kalkuli kiom da CO2 estas stokigita en tiu areo, kaj ricevi kompenso-pagojn kompare kun la CO2-certifikatoj.

Mi jhus partoprenis prelegon kadre de Jutta Paulus, MEP de la Verda Partio en Germanio:

<https://www.jutta-paulus.de/themen/klima-energie/>

Shia iniciativo pri marchoj:

<https://www.jutta-paulus.de/en/international-online-conference-bring-back-bogs-lets-re-peat/>

Jen esplorinstituto pri marchoj en Greifswald je la Balta Maro (germana kaj angla):

<https://greifswaldmoor.de/start.html>

kaj pli ĝenerale: asocio kiu aktivigas kontraŭ fosiliaj fueloj: <https://urgewald.org/>

Kaj ĝenerale pri pluvabaraj - en 7 lingvoj: [regenwald.org](https://regenwald.org)

--

### 2021-08-30 **Tornado minacas atomreaktoron en Usono**

Je fino de Augusto la hurikano/tornado „Ida“ detruis la elektro-linion (kablojn) de atomcentralo Waterford-3 (US/Louisiana) - nur kelkajn horojn post la malŝalto de la reaktoro. Necesas malvarmigi la reaktor-kernon dum 4 tagoj pere de dizela rezervogenerato - felice ili funkciis :)

Informo de „taz“ kaj en la jena mesaĝo bonvolu serĉi „Waterford“:

<https://strangesounds.org/2021/09/flood-watches-warnings-for-50-million-people-in-northeast-as-relentless-ida-marches-on-waterford-3-nuclear-generating-station-is-back-up.html>

kaj rekte el Francio pri la problemo de EPR en Taishan - pri kio mi skribis je la 1a de Decembro

2021: <http://www.observatoire-du-nucleaire.org>

kaj jen de CRIIRAD:

[www.criirad.org/Surete-nucleaire/Communique\\_de\\_presse\\_CRIIRAD\\_du\\_28\\_novembre\\_2021-Taishan\\_1.pdf](http://www.criirad.org/Surete-nucleaire/Communique_de_presse_CRIIRAD_du_28_novembre_2021-Taishan_1.pdf)

kaj jen informo kaj filmeto: <https://www.france24.com/fr/info-en-continu/20211128-incident-nucl%C3%A9aire-%C3%A0-l-epr-de-taishan-en-chine-la-cause-identifi%C3%A9e>

= =

### 2021-12-01 **Ledo el Amazoniaj praarbaroj**

En Usono - kaj certe ankaŭ aliloke - oni uzas bovo-ledon por luksaj seĝoj, ekzemple en automobiloj, ktp. . Nur unu plia malbona ekzemplo kiu kausas la detruon de praarbaroj.

Jen ligilo por subteni chi-tiun peticion: <https://www.thepetitionsite.com/de/takeaction/539/245/965/>

--

### 2021-11-29 **Akvo mankadas en Turkio**

La Bafa-Lago, turke Camici Gölü [chamichi ...], iam estis golfo, delonge granda lago rando de Egea Maro. Pro enveno de eroziita grundo pli kaj pli malgrandighis. Sed nun alvenas alia problemo, ĉar la rivero Meandro estas uzata de kamparanoj por akvumi la kampojn; krome pro la klimat-shangho malpli pluvas ene de Turkio pro kio kamparanoj uzas akvon el riveroj.

Simile temas pri la sala Lago Tuz en la Centro de Turkio. Pro malsufiĉe da pluvo ghi maletendighas, la Flamingo-birdoj ne plu povas nutri sin sufiĉe chi tie. Jen konciza informo en Esperanto:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Lago\\_Tuz](https://eo.wikipedia.org/wiki/Lago_Tuz)

(fonto: taz, Jürgen Gottschlich, 2021-11-29 p. 9)

--

### 2021-12-01 **franca atomreaktoro EPR en suda Chinio vibradis - Flamanville ighas „pli valora“**

La EPR en Taishan, suda Chinio, detruis kelkajn brul-elementojn, sekve eligis radioaktian gason.

Alian problemon montras la EPR en Flamanville, kiu ghis nun ne funkcias (feliche): la kostoj altighis de 3,3 al 19 miljardoj Euro.

Informoj en la franca ĉe CRIIRAD, kaj jen en la germana:

<https://www.mitwelt.org/atom-unfall-stoerfall-katatstrophe-akw-kkw-atomkraftwerk-aktuell>

----

### 2021-12-01 **Kio estas verda ? EU-taksonomio** (nomenklatur) opinias ke ankaŭ atomenergio

Por investoroj gravas scii ĉu ili vere investas en „verdajn“ firmaojn. EU komisiono „verdigas“ ne nur gas-energien, sed ankaŭ atom-energien. Uzi tergason estas iomete pli bone ol karbo, krome pli rapide reguligebla. Atomenergio de si mem ja ne eligas CO<sub>2</sub>, tamen por produkti uranion, la konstruajhoj kaj instalajhoj oni eligas grandan kvanton da CO<sub>2</sub>, kaj finfine sekura stokado de radioaktiva rubo denove bezonas multe da energio. Pro tio kelkaj preferas ĵeti ĝin simple en la maron (ekzemple ĉirkau Novaja Semlja)

(en la germana): [https://de.wikipedia.org/wiki/Atommüllproblematik\\_der\\_russischen\\_Marine](https://de.wikipedia.org/wiki/Atommüllproblematik_der_russischen_Marine)

(en la angla): [https://en.wikipedia.org/wiki/Decommissioning\\_of\\_Russian\\_nuclear-powered\\_vessels](https://en.wikipedia.org/wiki/Decommissioning_of_Russian_nuclear-powered_vessels)

Preskaŭ ĉiuj landoj kiuj uzas atomreaktorojn, konstruas atombombojn, kaj parte okaze de ekspluatado de nafto au diversaj ercoj produktadas atom-rubojn, kiun ili tro ofte ne sufiĉe bone traktas (subteraj kavoj, kiuj estas en tre stabila materialo)

(en la angla, ĉar en Esperanto tro konciza informo): [https://en.wikipedia.org/wiki/Radioactive\\_waste](https://en.wikipedia.org/wiki/Radioactive_waste)

(jen pri la taksonomio): <https://www.mitwelt.org/atomenergie-oekoenergie-eu-taxonomie>

= =

### 2021-11-23 **EU findecidis pri „nova“ agrikultura politiko** - nur eta pasheto al verdigo

Chi-foje ne temas pri belaj vortoj (kiel tro ofte) , sed pri financoj (387 miljardoj Euro ene de 5 jaroj) - subteno por agrikulturo. Lau chi-tiu decido 20% de agrokulturistoj - inter ili gigantaj konzernoj, kiel Nestle kaj la imperio de Babish (CZ), ricevos 80% de la financa subteno. La plej granda parto, t.n. „kolono“, estas 280 Euro/ha - la plej granda parto en direkto al monokulturoj; krome 24% (la EP postulis almenaŭ 30%) de tiu parto estas ligitaj al t.n. eko-skemoj: „Farm to Fork“ strategio, tio signifas uzi malpli da pesticidoj kaj fekundencoj (aparte kemia sterko).

La malpli granda parto estas por evolui la regionojn, kamparanojn, subteni unuopajn bienojn, kiuj laboras entute sen pesticidoj, respektas biodiversecon.

<https://www.martin-haeusling.eu/presse-medien/pressemitteilungen/2796-zur-heutigen-abstimmung-der-agrarreform-im-eu-parlament-nebelkerze-statt-reform.html>

Kaj jen la retejo de la Frakcio Verduloj - Europa Libera Alianco - en angla, franca kaj germana lingvoj:  
<https://www.greens-efa.eu/de/>

Oficiala retejo - en chiuj oficialaj EU-lingvoj - kaj tie ankaŭ troviĝas mallonga video kiu montras la evoluon de la CAP (komuna agrikultura politiko de EU):

<https://www.europarl.europa.eu/news/de/headlines/priorities/ernahrung-und-landwirtschaft/20210916STO12704/gemeinsame-agrarpolitik-wie-unterstutzt-die-eu-landwirte>

--

2021-11-17 **EU-Komisiono preparos leghon ghis 2023, kiu rilatas al renaturigo de la grundoj** ghis la jaro 2030; kiuj estas la bazo de agrikulturo. Temas pri resanigo de poluitaj terenoj, daurigebla uzebleco de grundo, eviti sigeligon (el-sekighon) de terenoj, haltigi la sekigon de marĉoj, krome ligita kun inform-devoj de la unuopaj ŝtatoj.

[www.deutschlandfunk.de/gemeinsame-agrarpolitik-was-die-eu-agrarreform-bringen-soll-100.html](http://www.deutschlandfunk.de/gemeinsame-agrarpolitik-was-die-eu-agrarreform-bringen-soll-100.html)

---

2021-11-22 **Bovinoj k.s. kaj klimato**

Vi certe scias ke bovinoj, ŝafoj kaj kaproj estas t.n. remachuloj. Ĉar ilia natura nutraĵo, gresoj, bezonas apartan prilaboron en iliaj stomakoj, ili havas du diversaj stomakoj. En unu el tiuj estas bakterioj kiuj povas metaboli/malkonstrui celulozon. Sed tiuj produktas metanon, kiun la bestoj eligas. Kaj metano estas simile forta forceja gaso kiel CO<sub>2</sub>. En Irlando oni ĵus evoluas nutro-aldonon el maraj algoj por bovinoj kiuj reduktas la eligon de metano. Finfine necesus redukti la kvanton da bovinoj, ĉar nuntempe eblas bredi pli multe ol la naturo ebligus, ĉar ili ne plu dependas de gresoj, sed ricevas aldone sojon kaj aliajn proteinriĉajn semojn - fakte oni detruas la praarbarojn por havi pli da pashtejoj en amazonio kaj ankaŭ en Europo ktp.; kaj aliflanke en norda Germanio oni bredas tro da diversaj brutaroj (porkoj, bovinoj, kokinoj, k.s.), dank al tia ne-natura nutrado, tial havas tro da sterkoj, kiu poluas la grundakvon.

= =

2021-11-14 **COP26** - Tutmonda Klimato-Konferenco en Glasgow finiĝis

Oni diskutis „eterne“ pri la akceptebla vortigo flanke de grandaj poluantoj:

“Akceli klopodojn redukti la uzadon de karbo”. Konsiderante ke karbo estas el ĉiuj la plej granda kaŭzo de altiĝo de la temperaturo, ĉi tiu estas bela granda interkonsento, sed la sindevontigo estis malfortigita de Barato (subtenita de P.R.Chinio). Alia celo estas nuligi subvenciojn por ne sufiĉe efikaj fosiliaj brulaĵoj; sed ĉi-rilate ili ne mencias aliajn fosiliajn brulaĵojn (ter-gaso, nafto) krom karbo. <https://ukcop26.org/the-conference/cop26-outcomes/>

Realeco tutmonde:

-5,4% da CO<sub>2</sub> kompare 2020 kun 2019 (dank al korona-viruso); sed en 2021 denove altiĝas supozeble ghis la nivelo de 2019.

La plej grandaj eligantoj da CO<sub>2</sub> estis 31% de P.R. Chinio, 14% de Usono, 7% de Hindio, sekvata de Rusio kaj Japanio. Sed se oni komparas kun la populacio, Usono multe pli eligas po-kape kompare kun la du aliaj.

Aparte Hindio kaj Chinio forbrulis pli da karbo ol antaŭe. En Usono kaj EU aliflanke oni uzis pli da ter-gaso, sed la CO<sub>2</sub>-eligoj reduktiĝis je 10%.

Arbaroj kaj marĉoj devus alpreni pli da CO<sub>2</sub>, sed tiuj pro la temperatura altiĝo funkcias malpli bone ol antaŭe (je 15%)

La permesata kvanto da CO<sub>2</sub> - por haltigi temperatur-altiĝon je 1,5°C - je la nuna jara bruligado estos forbruligota ene de 8 jaroj. Tio signifas ke necesas pli fortaj klopodoj redukti la uzon de fosiliaj brulajhoj. En la germana laŭ:

<https://www.deutschlandfunk.de/klimabericht-von-global-carbon-project-schlechte-bilanz-100.html>

Komento de AVE/mw:

La landoj en pli malvarmaj regionoj kompreneble devas investi en izolado, kie tio ankoraŭ ne eblas necesas redukti temperaturojn en loghejoj - kio signifas uzi varman vestaĵojn, uzado de varma akvo estas lukso. Konstruado - per betono - eligas multe da CO<sub>2</sub>; ankaŭ tie oni serĉas alternativojn. Nia trafiko konsumas multe da fuelo, se temas pri elektraj veturiloj kiuj uzas sunan energion, tamen necesas energio por konstrui tiujn, kaj la ekspluatado de Litio konsumas multe da akvo. La

konstruado de domoj - necesa pro la urbanizado - estas alia kauxanto. Unu el la grandaj kauxantoj de CO2-eligoj estas la militaro tutmonde. Bedaurinde UN ne sukcesas pacigi la diversajn flankojn. Kaj finfine necesas fini la kreskadon de la monda loĝantaro. Jam nun ni estas tro multaj, ĉar nia planedo estas malgranda - kaj ne kreskas. Ni devas lasi ankau sufiche da tereno kaj akvo al niaj kunvivantuloj en la naturo.

--

### 2021-11-03 **Mega-barlagoj mega-detruas biodiversecon**

Barlagoj por produkti kurenton kiuj ne havas taugan kromvojon por fishoj supren kaj ankau malsupren; tial grandskale detruas la regionan biodiversecon.

Alia temo estas la ghenoj de la deltaoj je la fino de tiuj gigantaj riveroj, ĉar multe de la transportata sablo, shtonoj kaj fajna materialo restas malantau la muroj de tiuj gigantaj barlagoj. Finfine la maro reprenas parton de tiuj terenoj, salo eniras la grundakvon.

Jen ekzemploj de 2 gigantaj barlagoj en P.R.Chinio; sed sur la pagho oni vidas diversajn temojn kaj mapojn kun la 10 plej severaj barlagoj.

La retejo estas en la angla, sed ili ofertas broshurojn pri tiu temo en la angla kaj en la china.

<https://www.hydrobiodiversityimpact.org/>

= =

### 2021-10-21 **Savi pluarbarojn pli rapide kontrau krimea senarbarigo**

Asocio „Rainforest Connection“ uzas mikrofonojn por monitori la protektitajn pluarbarojn. Malgrau la normala „bruo“ tie la softvaro distingas sonojn de segiloj.

Ilia prezidento Tophier White kunlaboras kun Infineon, por evolui pli efikajn rimedojn: auskulti pli foren, eltrovi pli bone la diversajn sonojn.

Kutime oni trovis nur pli poste segitajn arbojn; sed dank al (eluzitaj) saghtelefonoj kaj fotovoltajko nun eblas trovi la segantojn dum ilia laboro. Tiel eblas savi multe pli da arboj.

Jen filmetoj de prezentado enkadre de TEDx (parolo en la angla, subtitolita en multaj lingvoj):

<https://rfcx.org/>

Pli da informoj vi trovos je la NRO/CSO „Rainforest Rescue“ (savi la pluarbarojn), kiun mi jam citis semajnon antaue. Jen la ligilo kiu ebligas elekti inter 8 lingvoj:

<https://www.rainforest-rescue.org/>

La germana filio de RR estas akuzita pro ilia informo kontrau indonezia firmao kiu (senleghe ?) malarbarigas en la provinco Papua.

Jen peticio de RR en 6 diversaj lingvoj (je la malsupra parto de la pagho) al la Vicprezidentino de EU-Komisiono, Jourova, ke EU reguligu la rajton de NRO-jhurnalisto, faifistoj kaj NROoj protesti kontrau minacantaj praktikoj de konzernoj au registaroj.

<https://www.regenwald.org/petitionen/1241/demokratie-jetzt-schuetzen-stoppen-sie-einschuechterungsklagen>

jen ankau en la indonezia: <https://www.hutanhujan.org/petisi/1241/lindungi-demokrasi-sekarang-hentikan-gugatan-intimidasi>

---

### 2021-10-21 **ECI kontrau pesticidoj en agrikulturo** ricevis 1,2 milionoj da subskriboj por „savi abelojn kaj bienulojn“.

Koran dankon al vi ĉiuj kiuj ankau subtenis la EUropan Civitanan Iniciativon kiu postulis malpermesi pesticidojn. Nun okazas la kontrolado de la subskriboj en la diversaj landoj.

Informoj en 6 lingvoj: <https://de.monsantotribunal.org/>

Pri okazajhoj en Francio - ekz-e pri vino de Bordeaux: <https://alerteauxtoxiques.com/>

= =

### 2021-10-14 **Peticio protekti la pluarbarojn en DR Kongo**

la registaro planas permesi senarbarigon de milionoj hektaroj da pluarbaro, malgrau tio ke la lando ricevas centoj da milionoj por protekti tiajn arbarojn.

Bonvolu subskribi la peticion - jen en la germana:

<https://www.regenwald.org/petitionen/1246/den-regenwald-des-kongo-trotz-internationaler-klimagelder-abholzen-helfen-sie-das-zu-verhindern>

En la angla: <https://www.rainforest-rescue.org/>

En la franca: <https://www.sauvonslaforet.org/petitions/1246/menace-imminente-pour-la-foret-du-bassin-du-congo>

En tiuj 3 lingvoj ĝenerale pri la ne-malhavebla valoro aparte de pluarbaroj por la tuta mondo:

<https://www.sauvonslaforet.org/themes/climat/changement-climatique>

<https://www.rainforest-rescue.org/news/10399/climate-and-the-rainforest-the-position-of-rainforest-rescue>

<https://www.regenwald.org/themen/klima/klima-und-boeden>

- -

### 2021-08-23 **en la malseka regiono Pantanal denove brulas arbaroj**

Tiu regiono en sud-okcidento de Brazilo kutime jam la trian jaron mankas humideco, pro tio grandskale brulis arbaroj tie. Oni klopodas savi sovaghajn bestojn. Vi trovas plurfoje la informon en la germana se vi serchas „Pantanal“

[https://www.deutschlandfunk.de/fatale-fernwirkung-flaechenbraende-in-brasilien-durch.676.de.html?dram:article\\_id=496538](https://www.deutschlandfunk.de/fatale-fernwirkung-flaechenbraende-in-brasilien-durch.676.de.html?dram:article_id=496538)

Ankaur en [wikipedia.org](https://de.wikipedia.org) vi trovas la informojn pri tiuj bruladoj, bedaŭrinde la Esperanto-versio preskaŭ nur montras floran kaj faŭnon kiu estis tie; sed mankas ĉi-tiu aktuala minaco pri ĉi-tiu biosfero.

Komento AVE/mw: oni klarigis tion per varmego kiun transportas la maroj. Krom tio oni delonge avertas ne forhaki la arbarojn en Amazonio, ĉar tiuj transportas la humidecon de la Atlantiko ĝis al la Pantanal. Se mankas arboj, tiu „fluganta rivero“ reduktighas.

- -

### 2021-09-13 Akvo mankas pli ofte - aliflanke inundoj plifortighas

La Nobel-Premio 2021 por fiziko honoris la esplorojn pri la klimato. Kiu parto estas homfarata, kaj kio ne? Eblas evalui.

Jen raporto pri Usono - en la angulo de Nevada, Arizona kaj Kalifornio, multaj urboj dependas de la akvo de „Lake Mead“ [lejk mid], la plej granda bar-lago de la rivero „Colorado“. Ĉar malpli neghis dum la antaŭaj vintroj ĉi-tiu bar-lago havas tre malmulte da akvo.

(jen en la germana) <https://www.tagesschau.de/ausland/amerika/usa-lake-mead-101.html>

Ĉar la akvo-temperaturo de la Mediteraneo estas 2 Celsius-gradoj pli alta ol kutime, ankaur la humideco altighis; fakte falis pluvego kaj nuntempe kausas inundojn en sud-orienta Francio, suda Svisio, norda Italio - kaj movighos orienten.

<https://www.srf.ch/meteo/meteo-stories/starkniederschlaege-sehr-viel-regen-im-tessin-sowie-in-frankreich-und-italien>

<https://www.bbc.com/weather/features/50538115>

- -

### 2021-10-04 **EU neglektas imposto-truojn** - malgraur la Pandora Papers

Sven Giegold, MEP, Verduloj/Libera Alianco, informas ke EK volas redukti la nombron da imposto-paradizoj. Kontraue al tio necesus organizi tutmondan travideblon de pagitaj impostoj. Interese legi la longan liston de prezidentoj kiuj bezonas kashi sian riĉecon - aparte en eksterlandaj kashejoj.

(en la germana kaj angla): <https://sven-giegold.de/groteske-eu-steuerpolitik-pandorapapers/>

= =

### 2021-09-21 **Marie Toussaint, MEP, postulas pli rapidan protekton de pluarbaroj** - ankaur de la konsumantoj

La frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj delonge postulis pli bonan protekton de pluarbaroj, kaze de la importo de sojo, viando, tropikaj lignoj, palmoleo kaj diversaj fruktoj (bananoj ktp., kafo, kakao).

Europo kune kun P.R.Chinio estas la plej gravaj landoj kiu vivas lukse parte de tiaj importoj el regionoj kie oni dehakis pluarbarojn sur gigantaj areoj; krome temas pri kelkaj aliaj natur-terenoj (savanoj, marchaj regionoj): Amazonio - Pantanal, Indonezio, Madagaskaro, Afriko - kaj neforgesinde Siberio.

La EU-Komisiono unue volis prezenti leĝon/regularon ĝis Junio, sed nun volas prokrasti tion ĝis Decembro. Evidente tiajtutmondaj nutrajho-konzernoj kiel Cargill, Archer Daniel, Glencore, Nestle, kaj iliaj lobio-organizoj sukcesis meti „sablon en la motoron“ de EU.

<https://www.greens-efa.eu/dossier/our-groceries-shouldnt-cost-the-earth/>

<https://www.greenpeace.org/eu-unit/issues/nature-food/45732/sabotage-how-companies-lobby-against-eu-protection-for-the-worlds-forests/>

En Germanio nun indas voĉdoni (je la semajnfino) por „Buendnis 90 / Die Gruenen“ ĉar Germanio havas grandan influon al la komisiono.

- - -

### 2021-09-09 nesufiĉa decido pri agrikultura politiko de EU

bedaurinde la membroj de la agrar-komitato (kristanoj/popolanoj, liberaluloj, maldekstruloj kaj dekstruloj voĉdoni por kompromiso, kiu tute ne sufiĉas por savi biodiversecon, klimaton, kvaliton de la grund-akvo, kaj ne sufiĉe subtenas la rajtojn de la brutaro kaj la interesojn de malgrandaj bienuloj. [https://twitter.com/sven\\_giegold/status/1435960582797103105](https://twitter.com/sven_giegold/status/1435960582797103105)

EU ja fanfaronis pri t.n. „Verda Agendo / Verda Celo“ (Green Deal), sed tiu nun kompromiso ne enhavas ĉi-tiajn celojn por biodiverseco kaj naturprotekto, redukti pesticidojn kaj fekundencojn (artefaritan sterkon). Tio signifas ke ĝis 2027 la sumo de 387 miliardoj Euroj ne estos ligita al la celoj de tiu Verda Agendo. Ĉi-maniere denove multaj malgrandaj bienoj devos fini la ekziston, ĉar ilia laboro por sana kaj salubra medio ne estos honorigata :(

En Germanio nun indas voĉdoni (je la semajnfino) por „Buendnis 90 / Die Gruenen“ ĉar Germanio havas grandan influon al la komisiono; kaj krome la nacia politiko povas mem reguli kaj subteni super la EU-linio. Sven Giegold, MEP, dankas por via kunagado.

= =

### 2021-08-25 Methan eligoj - ekspluatado, tubaro tutmonde, tutmonde sed ankaŭ en EU

OMV AG, la aŭstria nafto-firmao laboras same kiel aliaj ankaŭ en Rumanio; kaj ĉi-tie la esploristo Turitto de Clean Air Task Force trovis pere de aparta fotilo multajn nubojn de metano el tiaj teknikaj instalacioj. OMV respondis ke ili esploras la aferon. Bedaurinde aliaj firmaoj respondis rifuzante. El satelitoj tutmonde oni kontrolas tiajn metano-nubojn; sed foti surloke estas la plej rekta maniero.

En Usono oni ekspluatas nuntempe per frakado - kaj je tiu maniero ankaŭ liberigas metanon en la atmosferon.

La Sentinel-satelitoj de la programo Copernicus analizas la atmosferon.

Turitto diras ke kalfatri tiajn truojn estas la plej efika vojo redukti la forcejan efikon pro metano.

Komprenble: <https://www.catf.us/>

<https://www.bloomberg.com/news/articles/2021-08-25/infrared-cameras-detect-methane-leaks-across-romania>

Pri satelitoj de kaj en): <https://www.ohb.de/magazin/space-encounter-mit-copernicus-baut-europa-sich-eine-erkenntnis-infrastruktur>

Vikipedio havas detalajn artikolojn - inkluzive de besto- kaj agrikulturo (en Esperanto nur tro koncize).

- - -

### 2021-08-11 Kion la homaro faris, kaj kion ni devus fari - eblecoj ...

Dokumento pri Antropoceno - la erao de homaro kiel plej granda povo sur nia Tero:

En la germana au franca: <https://www.arte.tv/de/videos/073938-000-A/die-erdzerstoerer/>  
videbla ĝis 2022-07-28

### 2021-08-10 Nova raporto pri la tutmonda klimato

La IPCC (internacia laborgrupo pri la tutmonda klimato-shanghigo) komencis prezenti denove la raporton kun la novaj informoj:

En pluraj lingvoj: [https://de.wikipedia.org/wiki/Sechster\\_Sachstandsbericht\\_des\\_IPCC](https://de.wikipedia.org/wiki/Sechster_Sachstandsbericht_des_IPCC)

Estas 3 grupoj: pri fiziko; sekvoj adaptebloj kaj minacoj; kion fari

La unua grupo nun prezentis (laŭ tiu informo en Vikipedio):

- estas tute klare ke la varmigo okazis (lando, akvo, atmosfero).
- inter 1990 (antaŭe estis tre malalta shangho) kaj 2020 la averaĝa surfaca temperaturo de la Tero altiĝis je ĉ. 1,1 °C. Ĉiu de la 4 lastaj jardekoj estis pli varma ol la antaŭanta.
- Estas tre verŝajne (je 66%) ke la tuta altiĝo estas kaŭzita de homara eligo de forcejaj gasoj.
- La rapideco de altiĝo de la mara nivelo estas trifoje rapide kompare kun la antaŭaj tempoj.
- La reiro de la glacheroj kaj de la arkta mara glacio estas kaŭzita je 90% de la homara influo.
- Dum la sekvaj 20 jaroj la altiĝo inter 1900 kaj 2040 atingos ,1,5 °C. Kaj tio egalas al la konsento de Parizo (2015).

Komento: necesas pli forte engaghi por alternativaj energioj kaj shparema uzado de energio.

= =

### 2021-08-05 **Stokado de CO2 en humuso au en marchoj.**

Intertempe estas stabila malvarma humida vetero en mez-Europo; sed en la sudo kaj aliloke brulas arbaroj kaj arbustaro. Oni diras ke la klimata varmigo kuzas pli fortajn vetero-ekstremojn. Jen ekzemplo kio eblas en rilato kun kulturado au ne-kulturado de terenoj, ke karbono estas stokita jare je surfaca tereno.

En wikipedia.org vi povas trovi detalajn informojn pri la diversaj tipoj de marchoj - bedaurinde en Esperanto estas nur komenca teksto kun kelkaj fotoj. Ili kolektas karbonon se ili estas daŭre humidaj. Sfagno, unu el la chefaj planto-familioj en marcho povas absorbi akvon same kiel spongo, tiamaniere granda tereno apud rivero povas absorbi pli da akvo oni pensus, se oni rigardas la terenon. Ghi povas kreski super la chirkaua akvo-nivelo je pluraj metroj - ghi kreskas malrapide, chirkau 1 mm jare.

Se oni sekigas marchojn oni povas "rikolti" torfon; sed tiu materialo rapide estas oksidita, ech povas bruladi dum longa tempo sub la surfaco. Pro tio tute ne indas uzi torfon kaj ankau ne shanghi tian terenon al agro, forkondukante la akvon.

Vi eble scias ke Pantanal apartenas al la plej grandaj marcho-regionoj; se oni daurigas la mal-arbarigon en Amazonio la transporto de akvo trans Amazonio reduktighos, kaj eble kuzos savanon au dezerton. Brulantaj arbaroj sekvos

Vi certe povas legi pli en via lingvo elirante de: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Torfejo>

= =

### 2021-08-04 Diskuto pri estonteco de Europo - kio gravas - niaj proponoj

Jen denove - kion mi jam sendis la 13a de Junio:

*Ĉu vi jam vidis la proponon de Seán Ó Riain: The EU needs improved language learning <https://futureu.europa.eu/processes/Education/f/36/proposals/23893> kiu pledas por grandskala elprovo de la esperantlingva projekto Multlingva Akcelilo en bazaj lernejoj?*

*Se vi konsentas kun tiu propono, bonvolu apogi ankaŭ ĝin! Antaŭdankon, Klaus*

<http://futureu.europa.eu/conversations/11266>

Tie vi trovos ankau 34 aliajn proponojn - serchu „Esperanto“.

La strategio estas interesi la teamon/panelon kiu poste elektos el la temoj, kaj proponos ilin al la EP.

--

### 2021-08-04 **Bovoj kaj bubaloj altigas la biodiversecon en prerio**

30-jara eksperimento en nord-oriento de Kansas, Usono montris ke sur la sama tereno „Konza Prairie“ pashtantaj bovoj au bubaloj subtenas multecon de biodiverseco. Sen tiaj bestoj la herbejo ne tre shanghighas kaj preskau ne alvenis novaj planto-specioj; bovoj kaj aparte bubaloj zorgas ke la biodiverseco de jaro al jaro plibonighas.

Jen la retejo de la esploristo/universitato, kiu esploras la resiliencon (stabilecon) de ekosistemoj: <https://zaratajczak.wixsite.com/zak-ratajczak/research>

--

### 2021-08-04 **Hidrogeno perdighas en la kosmon - akvo en fora estonteco mankos**

En la jaro 2012 sciencistoj raportis ke de nia planedo Tero eliras hidrogeno en la kosmon en kvanto de 90.000 tunoj jare.

Mi supozas ke chiu el vi scias, ke akvo konsistas el hidrogeno kaj oksigeno (H2O) ; se H mankos ni havos situacion kiel nun sur la Marso, kie nun mankas akvo. Ne timu nun, char temas pri multaj milionoj da jaroj; tamen ni - la homaro - ne rajtas kauzi ke perdo da akvo minacos ech en kvanto de duono de la nuna situacio.

Nun oni intencas uzi hidrogenon multe pli ofte por stoki/reservi energion (ekzemple de PV au vento), kaj uzas ghin por re-produkti kurenton lau neceso.

Mi metis chi-tiun temon en la futuro-diskuton de Europa Komisiono. Bonvolu pripensi kaj eventuale subteni mian proponon ke EU devas atenti ke plejeble malmulte da hidrogeno eliros en la kosmon.

Jen la ligilo kie vi povas subteni mian proponon. Oni povas elekti la lingvon por apliki la paghojn, kaj ech automate traduki la proponojn en aliajn europajn lingvojn, sed la kvalito de tia traduko estas mizera - kion mi kontrolis je mia propra propono.



<https://futureu.europa.eu/processes/GreenDeal/f/1/proposals/57058?locale=de>

Literatur: (Spiegel, 2012-03-09)

<https://www.spiegel.de/wissenschaft/natur/wasserbilanz-die-erde-hat-ein-leck-a-819868.html>

Originalliteratur über Isotopenverteilung zwischen Wasserstoff und Deuterium:

<https://www.pnas.org/content/early/2012/03/02/1115705109.short?rss=1>

= = **Konsiljoj por daurigebla nutrado - ne peki pro senarbarigo !**

Ekzistas multaj aferoj relative facile fareblaj kiel ekzemple :

- Aĉeti niajn LOKAJN nutraĵojn en biologia butikoj (panon - legomojn – fruktojn – cerealojn – legumenacojn, viandon lakton ktp)
- NE aĉeti ege malbonajn transformitajn nutraĵojn kiel ekzemple la fi-faman « Nutella » kun palmoleo ktp – eblas vidi sur etiketoj kiuj estas la ingrediencoj de tiaj malbonaj produktoj transformitaj kiel ekzemple pretaj lazanoj en superbazaroj
- Mem kuiri hejme simplajn kaj bonajn nutraĵojn (ĉi tagmeze mi manĝis kompletan rizon – kompletan lenton – patatojn kaj ĉi posttagmeze unu abrikoton kaj unu persikon / nuntempe estas tre facile TRE BONE sin nutri)

Tio estis por eviti senarbarigon de pluarbaroj

Alia grava kaj granda paŝo por nia planedo estas manĝi vegane! Tion ni faras en nia familio de 5 jaroj kaj ĉio glatas (miaj sanganalizoj estas tre bonaj kaj mi tute ne havas nutromankojn)

Plej amike, Jean-Claude Roy

==

2021-07-20 **Monsunaj inundo-katastrofoj ankau en Europo**, brulantaj arbaroj en norda Amerikio  
Nekonata pluvego trafis kelkajn regionojn en Germanio (simile okazis jam plurfoje ekde 2002 en meza Europo), malgrandaj riveretoj ighis riveregoj kiuj detruis au ech formetis domojn, automobilojn kaj tranĉis stratojn ktp.; akvo kaj kurento-provizo estis detruita. Mortis eble 200 homoj, ankoraŭ oni ne scias detale.

Dum babilado de „ekologiuloj“ dum la Virtuala Kongreso“ de UEA mi audis ke tiaj pluvegoj estas normalaj en Pakistano au Nepalo, ke chi-kaze mortas ech 2000 homoj.

Samtempe en nordokcidenta Usono kaj Kanado bruladas arbaroj. „Kulpas“ la „omega-vetero“ - la chirkaupolusa ghet-fluo ( angle: jet-stream, en eo.wikipedia.org: shprucfluo (?) ),

vento en la altaj tavoloj de la atmosfero (ghis al la Stratosfero) nuntempe orientighas preskau en cirkloj (formo simila al la greka litero „omega“).

Oni supozas ke tio estas kauxita de la altigita monda temperaturo, kiu kauxis malfortigon de tiu vento-fluo. Nun oni diskutas kio necesus por eviti tiajn sekvojn por la infrastrukturo: ne konstrui domojn apud riveretoj, pli bone konstrui stratojn kaj kablo-liniojn en vundeblaj regionoj. Etendi la spacon apud riveroj kie akvo povas sternighi.

= =

2021-07-06 **Usona militshiparo (US Navy) militas kontrau delfenoj**, fishoj kaj aliaj marestajhoj  
Ne nur militoj mortigas homojn, detruas urbojn kaj ne respektas la naturon (ekzemple venenigas la medion), misuzas fosiliajn fuelojn.

Dum ekzercoj\* kaj proveksplodoj okazas detruoj.

Jen tre malbona - ech tristiga - ekzemplo: US Navy eksplodigis 40.000 „pound“ bombon en la maro antaŭ la bordo de Florido (Usono) por elprovi kaj pruvi ke la milit-shipo (Iau Gerald Ford) estas stabila kontraŭ tiaj proksimaj eksplodoj. Jen la informoj kaj konciza video:

<https://t.co/LWoXUsTQmP?amp=1>

Ili informas ke la eksplodoj okazis dum tempo kiam plejmulto de la grandaj fishoj kaj mar-mamuloj ne trovighas en tiu regiono. Sed la medio-protektantoj menciis ke oni ne elektis tempon kiam plej malmulte da mar-mamuloj loghas / trovighas tie. Chiukaze mar-mamuloj ech en tre granda distanco de pluraj kilometroj estas tre damaghitaj de tia bruo, char ilia vivo dependas de bona aud-kapablo.

Jen la peticio direktita al US Navy (diversaj lingvoj eblas):

<https://www.thepetitionsite.com/de/takeaction/585/218/392/>

en la angla: <https://www.thepetitionsite.com/en/takeaction/585/218/392/>

Jen la retejo al tiu shipo kaj konciza video de la eksplodo(j), kiu ne montras mar-bestojn:

<https://t.co/LWoXUsTQmP?amp=1>

Komento AVE/mw: mi komprenas, ke aliaj „grandaj nacioj“ kun mar-armeo faras similajn testojn.

= =

2021-06-30 **EU-Komisaro pri sano kaj nutrajho-sekureco** - estu respondeca ankau por Besto-Protokto

Bonvolu subteni kaj diskonigi la peticion de Sylvia Spurek (deputito Verduloj/Regionalistoj de Pollando de la EU parlamento) kaj de multaj aliaj de diversaj frakcioj, kaj krome de multaj asocioj en multaj EU-landoj, por la bonstato de la bestoj. La celo de tiu peticio estas ke la komisaro pri sano ighu respondeca ankau por la Besto-Rajtoj. Char nur tiel eblas pli bone respekti la brutaron kaj bestojn ghenerale. Multaj lingvoj elekteblas: <https://euforanimals.eu/fr>

(dankon al Jean-Claude Roy por la ligilo)

2021-06-29 **UV-328 - protektas plastajhojn kontrau UV-radioj, sed minacas la vivantaron !!**

Tiu kemiajho - 2-(2H-Benzotriazol-2-yl)-4,6-di-tert-pentylphenol - apartenas al PBT-materialo (persista, bioakumulanta, toksa), au POP - persistanta organika poluajho; oni trovis ghin en fishoj. Greenpeace atentigis ke ghi estas unu el tiaj minacantaj dangheroj de mikro-plastajhoj.

<https://unearthed.greenpeace.org/2021/06/28/microplastics-chemicals-lobbying-oil-industry-stockholm-convention/>

= =

2021-06-30 **Aboli formanghi la plubarbarojn en EU, P.R. Chinio - kaj aliaj landoj**

Jen peto de Marie Toussaint, MEP de EELV, Francio, kaj informo pri la bezono influi la EU-Komisionon, ne malfortigi la leghon malpermesi importojn el terenoj de iamaj plubarbaroj.

Grandaj konzernoj kiel Cargill, ktp. ege premas la politikistojn malfortigi tiun leghon; char ilia profito dependas de libera agado. Pro tio necesas montri al la „registaro“ de EU ke la civitanoj preferas respondecan politikon - finfine por daurigeblo de biodiverseco kaj sana naturo sur nia Tero. Ni ne estas la solaj vivantajhoj, sed respondecas pro nia agado.

Temas pri t.n. importita senarbarigo - ni achetas multajn produktojn kiel ekzemple lignaj, soj-faboj, tofuo, viando kaj lakto kiu bazighas parte sur soj-faboj, palm-oleon en multaj produktoj.

EU kaj P.R. Chinio estas la plej grandaj konsumantoj de tiaj produktoj. Pro tio ni respondecas plej grave- Jen la informoj en la angla kaj franca:

<https://www.greens-efa.eu/dossier/faire-nos-courses-ne-doit-plus-detruire-la-planete/>

<https://www.greens-efa.eu/dossier/our-groceries-shouldnt-cost-the-earth/>

Je la fino de tiu teksto vi trovas ligilon al preparita letero direktita al Frans Timmermans, Vic-prezidento de la EU-Komisiono, al kiu vi povas alighi.

**Komento** AVE/mw: kompreneble ni kiel konsumantoj povas kaj devas atente elekti kion ni achetas.

= =

2021-06-25 **EU decidis KAP** - Komunan Agrikulturan Politikon, maltauga kompromiso

Malgrau multaj protestoj la Komisiono kaj Europa Parlamento faris nur malgrandan shanghon de KAP. Bedaurinde tiu validos dum la sekvaj 7 jaroj.

Ili decidis ke nur 25% estu por ekologia agrikulturo, sed la kondicho estas malfortaj. La kristanoj kaj liberaluloj preferas la grandajn kapitalismajn agro-konzernojn. Bedaurinde la socialdemokratoj kiuj unue kunlaboris kun la frakcio de Verduloj kaj Regionalistoj, poste decidis vochdoni kun la t.n. kristanoj. Aparte malbone estas, ke la tre malgrandaj bienuloj tute ne ricevos tian subvencion; malgrau tio, ke ili kutime laboras pli naturafable.

Grandaj vortoj kiel „Green Deal“ (verda konsento ?) estas facile direblaj, sed oni ja ne sinddevigas sekvi tian principon.\*

(en la germana) <https://sven-giegold.de/gap-einigung-absage-an-agrarwende/>

(en la angla kaj la germana): <https://www.greens-efa.eu/de/artikel/press/agrarwende-bleibt-aus-sch%C3%B6ne-%C3%BCberschriften-wenig-inhalt>

\*) simile EU jhus decidis tro malfortan Klimato-leghon.

(en la angla, franca kaj germana): <https://www.greens-efa.eu/de/artikel/press/das-europ%C3%A4ische-klimagesetz-erf%C3%BCllt-nicht-die-pariser-klimaziele>

**Komento** AVE/mw: se la t.n. Kristanoj sekvus sian kredon, ili multe pli respektus la naturon. Lau la biblio Dio donis al la homoj la naturon por uzi kaj samtempe gardi ghin, ne por ekspluati je plej

granda profito. Hierau urbeto en Chehio estis trafita de fortega tornado, la rostro estis longega, tie la vento havis rapidecon de ch. 300 km/h. Oni supozas ke pro la plimarmigho tiaj lokaj katastrofoj pli ofte okazos.

[www.theguardian.com/weather/2021/jun/25/czech-republic-tornado-deaths-villages-damage-south-moravia-hodonin-hrusky](http://www.theguardian.com/weather/2021/jun/25/czech-republic-tornado-deaths-villages-damage-south-moravia-hodonin-hrusky)

Ankau la monokultura agrikulturo subtenas tiajn uraganojn; kaj rezultas en pli granda eligo de CO2 en la atmosferon.

Denove malbona ekzemplo kiu minacas iaman ekologian juvelon de Europo - la Mar Menor.

--

### 2021-06-24 **Batalo por repurigi la lagunon Mar Menor en sud-orienta Hispanio**

Tiu granda laguno estigis dank' al tre longa malalta sablo-benka. Ghi estas la plej granda salhava laguno de Europo. Ghi estas malprofunda. Pro la bela regiono estas granda turismo, sed eble pli forte minacas la agrikulturo (por eksporto) kiu ek de ch. 10 jaroj etendighis preskau al la bordo de la laguno. Aparte pro vetera katastrofo en 2019, sed ankaŭ kontinue nutrajtoj kaj pesticidoj de la kulturo enfluas en la lagunon. Pro tio ghi estis eutrofigita. La sekvoj estis ke algoj abundas, laminario k.s. plantoj ne plu havas sufiche da lumo krome mankas oksigeno. La naturprotektantaj CSO-oj diras ke la registaro estas respondeca, ĉar permesis (au ne interesighis) agrikulturon kaj ankaŭ troan turismon.

Jen ĝenerala informo en la hispana: <https://wikimurcia.com/mar-menor/>

kaj en aliaj lingvoj: [https://es.wikipedia.org/wiki/Mar\\_Menor](https://es.wikipedia.org/wiki/Mar_Menor)

= =

### 2021-06-15 **Peticio por Daurigebla agrikultura politiko de EU** - al germana agrar-ministrino:

La subvencioj por agrikulturo ene de EU ampleksos 387 miljardejn Euro dum la sekvaj 7 jaroj.

Bedaurinde la lobiado de la grandaj agro-konzernoj influis la komisionon kaj la naciajn ministrojn de agrikulturo, ekz-e la germanan ministrinon Julia Kloeckner (CDU), daurigi pli-au-malpli same kiel en antaŭaj jaroj, donaci ĉefe laŭ la areo, kaj preskau ignori laŭ la efiko por la naturo. Tio subtenos monokulturojn kiuj minacas kaj la biodiversecon, kaj la klimaton kaj ankaŭ la multajn malgrandajn familiajn bienojn.

Pri biodiverseco mi skribis antaŭ kelkaj tagoj kion postulas multeco de la Europa Parlamento

Necesas agrikultura subvencio kiu agas afable kun la naturo:

- Subteno shanghi al ekologia kulturado sur 25% de la areoj kaj 10% kiuj montras la multecon de biodiverseco, fakte temas pri malgrandaj kampoj sen monokulturo, redukto de pesticidoj kaj fekundencoj je 50%, malpermeso de Glifosato kaj pluraj aliaj pesticidoj.

- Subteno de organika (Bio-) agrikulturo. Bone nutrita edafo altigas la kvanton de humuso kaj tiamaniere stokas karbonon en la grundon. Grandskala monokulturo detruadas la grundon. La kvalito kaj kvanto de humuso reduktighas, ĉar pro tiaj pesticidoj kaj artefaritaj fekundencoj reduktighas la vivantaro en la grundo, la tiel nomata „edafo“: lumbrikoj, vostsaltuloj, algoj, fungoj, bakterioj, ktp.. Redukto de humuso samtempe signifas eligo de CO2, ĉar humuso enhavas multe da karbono.

- Protekti kaj re-naturigi marĉojn kaj pro la biodiverseco kaj pro la klimato. Se oni sekigas torfajn areojn, la torfo rapide estas oksigenigita kaj malaperas en formo de CO2. Se vi ankoraŭ uzas torfon por via ĝardeno, vi mem spertas ke tiu ne longe restas, sed malaperas.

La Peticio (bedaurinde nur en la germana) estas direktata al ministrino Kloeckner:

[change.org/agrarwende-jetzt](https://change.org/agrarwende-jetzt)

Informoj de MEPOj: Benoit Biteau, Tilly Metz kaj Martin Haeusling

<https://www.greens-efa.eu/dossier/we-want-a-cap-that-is-fit-for-purpose/>

= =

### 2021-06-01 **Europa Parlamento por imposta justeco - Tutmonda minimuma imposto 15%**

EP ĵus interkonsentis pri kompromisa teksto por publika laŭlanda raporto de transnaciaj firmaoj.

Firmaoj funkciantaj en Eŭropo kun jara vendosumon de pli ol €750 milionoj en la lastaj du sinsekvaj budĝetaj jaroj devos sciigi rilatan imposto-informojn de cxiu lando inkluzive de tiaj imposto-oazoj.

Informo de Sven Giegold, MEP, Verduloj/Libera Alianco:

<https://sven-giegold.de/en/>

<https://sven-giegold.de/einigung-laenderbezogene-steuertransparenz-von-unternehmen/>

--

### 2021-06-10 **EU-Parlamento voĉdonas por Biodiverseco**

koncerna legh-propono ricevis la voĉojn de Verduloj-Libera Alianco, Socialdemokratoj kaj Maldekstruloj. Jen la temoj subteni strategion favore al biodiverseco:

- ghis la jaro 2030 estu protektitaj 30% de grundaj areoj, kaj 30% de maraj areoj;
  - 10% estu pli forte protektitaj (praarbaroj, klimato-rilataj ekosistemoj kaj marĉoj);
  - en chiu EU-lando estu protektitaj la diversaj ekosistemoj;
  - oni starigu liston de permesataj agadoj en tiaj areoj
  - necesas ĝenerala legho por protekti la grundon: eviti fermon kaj sigeligon de grundo, poluadon, mikroplastajhoj (ekz-e pro kompostmaterialo el loghejoj);
  - subteno shanghi al ekologia kulturado sur 25% de la areoj kaj 10% kiuj montras la multecon de biodiverseco, fakte temas pri malgrandaj kampoj sen monokulturo, duonigita uzo de pesticidoj, kaj redukto de fekundencoj je 20%, malpermeso de Glifosato.
  - ne plu subvencii la uzo de fosiliaj fueloj, montri liston de subvencioj kiuj damaghas la natur-medion.
- Jen la ligilo en chiu oficialaj lingvoj de EU:

[https://www.europarl.europa.eu/doceo/document/A-9-2021-0179\\_DE.html](https://www.europarl.europa.eu/doceo/document/A-9-2021-0179_DE.html)

= =

2021-06-10 Karaj geamikoj en Australio kaj tutmonde, mi ĵhus vidis en nia komuna franca-germana publika TV-kanalo arte.tv raporton pri la homfarita dezertigo en Australio.

Tro multe da bovoj, dromedaroj (sovaghe vivantaj, iam importitaj kameloj) k.s. kaj maltauga agrikulturo detruis la fekundan grundon. Sed ankaŭ estas espero:

- bienisto kiu reduktis la gregon da bovinoj al dek-ono, kaj kreas parcelojn kun muretoj kiuj kontraŭas la erozion de la grundo; li jam vidas revenon de la natura fekundeco.
- krome, oni komencas lerni de la aborigenoj pri diversaj plantoj, uzi larvojn de insektoj kiel nutraĵo kaj kiel kontrolitaj fajroj helpas al re-kreskado de taugaj plantoj. ...
- tio ankaŭ montras ke la lingvo de indigenoj (ĝenerale) enhavas la scion pri la speciala naturo kie ili vivas; kaj ankaŭ pro tio estas protektenda.

La filmo estas en la medio-teko de arte.tv ghis 15a de Julio - en la franca kaj en la germana:

<https://www.arte.tv/fr/videos/053446-004-A/planete-sable/>

Mi supozas ke plejparte nenio nova por vi, sed ankaŭ grava informo por ni chiu.

= =

### 2021-05-20 **Peticio al EU kontraŭ fishkaptado sur grundo de maroj**

Fiŝkaptado-retoj altaj kiel trietaĝa konstruaĵo kaj larĝaj kiel futbalkampo elkavigas/plugas la marfundon ĉiutage. En sekundoj, ili frakasas ĉion en ilia vojo, mortigantaj delfenojn, fokojn, koralojn, kaj centoj da aliaj specioj. Okazas ĉe ni en Eŭropo, en la juvelo de niaj oceanoj, ene de protektitaj maraj teritorioj. EU asertas, ke ili protektas niajn marojn kaj restarigas biologian diversecon dum ĉi tiu ekologia kaj klimata krizo. Ni subtenu tiun peticion por certigi, ke marestaĵoj estu tuj protektataj de ĉi tiu neakceptebla detruo.

En la jenaj lingvoj: de, en, fr, it, pl <https://act.wemove.eu/campaigns/bottom-trawling>

---

### 2021-05-17 **Lumbriko - nia helpanto por bona grundo minacata**

**tiu filmo estas videbla ghis la 9a de Junio**, en la franca kaj la germana:

Ghi montras aparte la vivon de diversaj lumbrikoj, inter ili la plej longa en Eŭropo kiu loĝas en la Nigra Arbaro. La filmo ankaŭ montras la diversajn minacojn de lumbrikoj (kaj alia subgrunda vivantaro) pere de Glifosato.

<https://www.arte.tv/fr/videos/084700-012-A/xenius-vers-de-terre-les-meilleurs-allies-de-nos-sols/>

Filmo pri la rilato inter humusa grundo kaj klimato:

<https://www.youtube.com/watch?v=w5da0aCiaqY>

Jen asocio pri daŭripova kulturado de grundo

<https://www.bodenwelten.de>

---

2021-05-06 plastajhoj kaj mikroplastajhoj - kie perdighas la plastajhoj

denove, kun pliaj

Dokumenta filmo (en la franca kaj germana) kiu montras detalojn pri la muelitaj partikloj de plastajhoj en la maro. Ankau pri la amasigho de kemiajhoj.

<https://www.arte.tv/fr/videos/062231-000-A/oceans-le-mystere-plastique/>

Ankau la videblaj plastajhoj ghenas kaj detruas vivojn - ech minacas la tutan biosferon.

Kaj jhus informita de Flory Witdeuckt, filmo (4 min) kiu montras amasojn da albatrosoj, kaj kiamaniere kelkaj el ili suferas kaj mortas pro manghitaj plastaj tegoletoj, ktp. (ankorau en la angla, sed la bildoj ne bezonas klarigon)

<https://player.vimeo.com/video/218502282>

Detalojn pri tio en Esperanto vi vidas en mia prezentajho (jam de 2012): [www.verduloj.org/akvo.htm](http://www.verduloj.org/akvo.htm)  
= =

2021-04 Chu vi scias: **Gluten, en rilato kun Glifosato - herbicido kiun ni manghas kaj trinkas**

Temas pri dokumenta filmo, 79 min, kiu estas videbla en la „Medioteko“ de ARTE.tv ghis la 12a de Majo 2021 !

Por planti tritikon „dura“ en pli nordaj regionoj necesas rapide maturighanta tipo de tia greno. Oni shprucas glifosaton ne nur por mortigi chiajn trudherbojn, sed ankau por sekigi la spikojn nur je mallonga tempo antau la rikolto. Ne-mirinde ke en biero au en farunaj produktoj pli ofte trovighas glifosato.

Monsanto ja chiam diras ke ghi ne influas nian sanon. EFSA - la Europa Instanco pri Sekureco de Nutrajhoj - nur formale kontrolis la prezentitajn dokumentojn - la esploroj estis menditaj de Monsanto (la produktanto de Glyfosat). Sed Monsanto ne interesighis montri sano-problemojn. Bedaurinde la EU-komisaro V. Andriukaitis ne povis malpermesi denovan tempodauron por la uzado de glifosato. Necesus ke EFSA mem organizas kaj saghe elektas kiajn esplorojn oni faru por havi salubrajn nutrajhojn - por brutaro kaj homaro. Kompreneble Monsanto ne estas la sola firmao kiu neglektas la sanajn sekvojn de siaj produktoj.

Nia mikrobiomo - la bakterioj en nia intesto - estas endangherigata de glifosato, char tiu havas samajn ankrojn en proteinoj kiel Glycin (glicino - la unua el la 20 bazaj aminoacidoj, surbaze de kiuj la vivo funkcias).

Krome unu el la aditivoj en la vendata glifosato „Round Up“ estas N-fosfometilglicin, kiu ankau ghenas la celulojn de nia intesto, tiel ke tie sekvas lokaj inflamoj kiuj kauzas la sano-problemojn.

Pro tio la filmo detale diskutas la nuntempan, kvazau industrian agrikulturon kaj prilaboron de faruno-enhavaj nutrajhoj: monokulturo subtenata de glifosato, artefaritaj fertiligenzoj - perdo de vivantajho en la grundo.

Por produkti bonan panon oni bezonis multe da tempo; dum tiu tempo la gluteno estas reduktita. Sed modernaj bak-firmaoj ne lasas tiom da tempo pro maturigo de la pasto; tial pli da gluteno restas en la pasto ol antau 20-30 jaroj. Tiaj industriaj pastajhoj enhavas malpli da valoraj spuraj metaloj kiel Zinko, Fero, Mangano, Magnezio kaj Kobalto.

Kune chi-tiuj malbonaj parametroj „rezultigas“ ke pli kaj pli da homoj suferas de celiakio; esploroj ech montris ke autismo kaj demenco same plimultighis.

Tiu dokumenta filmo de 79 minutoj „Gluteno la malamiko en via pano“ estas videbla kaj auskultebla en la franca kaj germana, subtitolita en la itala kaj hispana, sed ne en la angla au pola.

<https://www.arte.tv/fr/videos/090077-000-A/gluten-l-ennemi-public/>

<https://www.arte.tv/de/videos/090077-000-A/gluten-der-feind-in-deinem-brot/>

--

2021-04-25 **Daurigebla utiligo de plubarbaro en la Respubliko Kongo**

Firmao havas licencon por granda tereno. Utilas de tiu dum 30 jaroj chiam nur unu sub-tereno; poste ciklo rekomencighas. Ili notas chiujn de la valoraj arboj, segas nur sufiche dikajn, sed ne la plej dikajn malnovajn. Ekzemple la gorilo-simioj povas resti en sia teritorio.

Jen filmo pri diversaj pozitivaj temoj:

- utiligo de plubarbaro

- kultivi la almojn ? en Svisio (kaproj, shafoj, bovinoj - la kamparanoj ricevas subtenon se iliaj herbejoj portas minimumon da valoraj plantoj.

- protekto de anasoj sur arhipelo ? en norda Norvegio, la homoj zorgas por protektitaj nidoj  
<https://www.arte.tv/de/videos/097512-002-A/gute-nachrichten-vom-planeten/>

= =

### 2021-04-22 **Tago de la Tero**

En chiu minuto nia Tero perdas arbarojn en areo kiu egalas al 27 kampoj por piedpilko. Aliflanke: en la jaro 2017 senarbarigo okazis en 29,4 milionoj hektaroj. Detaloj pri tiu temo en Esperanto kaj certe ankaŭ en via lingvo: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Senarbarigo>

Tio ne nur okazas en Amazonio au Indonezio, sed ankaŭ en Eurazio - chi-kaze temas pri Ukrainio, kie okazas ne-leghaj de-forestadoj en granda kvanto.

Okaze de chi-tiu internacia ago-tago mi sendas mesaghon de niaj EU-parlamentanoj Anna Deparnay-Grunenberg (Germanio) kaj Thomas Waitz (Austrio) kune kun 10 aliaj informis kaj petas skribi pet-leteron al la EU-komisaro Timmermans kaj al la Medio-Komisaro Sinkevičius.

Jen 2-minuta video pri sen-arbarigo en Ukrainio de Anna, eblas subtitoloj en: de, dk, es, fr, it, nl, pl, pt; la parolo estas en la angla.

<https://www.youtube.com/watch?v=EjXSMskPsYc>

<https://www.youtube.com/#save%20our%20forests>

EU nuntempe klopodas krei leghon lau kiu la vojo de materialoj - ekzemple ligno - kiujn oni importas en la EU-on:

- estu travidebla kaj sekvebla;
  - enmetu chiajn biosferojn, ne nur arbarojn, sed ankaŭ savanojn, humidajn areojn au herbejojn;
  - respektu la Homajn Rajtojn, aparte ankaŭ de indighenaj popoloj;
  - devigu ankaŭ la financajn entreprenojn kiuj subtenas la investon en ekspluatado de naturaj resursoj
- Tiu mesagho estas en la angla, franca kaj germana

<https://www.greens-efa.eu/en/campaigns/deforestation>

= =

### 2021-03-22 **Internacia Tago por la Akvo**

Akva tago 2021 - kio signifas „akvo“ por mi !

Unuiĝintaj Nacioj alvokas ekde 1993 ĉiujare la 22an de marto por trakti akvajn problemojn. La alvoko por 2020 estis: »Ni ne havas tempon por atendi. Ĉiuj povas fari ion!« kaj atentigas pri la diversaj rilatoj inter klimata ŝanĝo kaj akvo. Pli efika akvoprovizado reduktas la emision de klimataj gasoj kaj la adaptiĝo de la tuta akva sektoro al klimata ŝanĝo protektas sanon kaj savas vivojn. (dankon al Roland Schnell)

jen la retejo de UN en 6 lingvoj: [https://eo.wikipedia.org/wiki/Monda\\_akvotago](https://eo.wikipedia.org/wiki/Monda_akvotago)

Niaj per-Esperanto-agoj chiam ankaŭ temas pri akvo: rearbarigo kaj salubra trinkakvo; kaj unu el la plej aktualaj tutmondaj akvo-problemoj estas la plastajhoj en la akvaroj: riveroj, lagoj kaj la maroj - tie vi trovos diversajn informojn, i.i. prezentajhon de AVE:

<http://www.verduloj.org/dokument.htm#akvo>

**Komento** AVE/mw: la aktuala esploro sur Mars havas la temon „trovi spurojn de akvo“.

Mi esperas ke la Tero ne havos la saman sorton, iam esti sen videbla akvo. Kial: ĉar la nuna amasa uzado de hidrogeno kausos pli grandan perdon de la gaso H<sub>2</sub> (akvo = H<sub>2</sub>O) en la kosmon, vi ja scias ke H estas la plej malpeza elemento.

- -

2021-03-21 Internacia Tago kontraŭ Rasismo

Bonvolu legi detale en la 6 lingvoj de UN:

<https://www.un.org/en/observances/end-racism-day>

Ni esperantistoj scias ke la gefiloj de L.L. Zamenhof estis mortigitaj de la naziista 3-a Germana Regno pro rasisma ideologio. Tio estas temo ekzemple en la libroj de Ulrich Lins, „La danghera lingvo“, kaj de Roman Dobrzynski, „Zamenhof en Varsovio“.

Homoj suferas pri diversaj formoj de rasismo en diversaj partoj de la mondo, en Usono oni klopodas redukti la rasismon de blankuloj kontraŭ nigruloj. En P.R.Chinio la registaro subpremas la grandajn minoritatojn: tibetanoj kaj uĝuroj, krome decidis en 2020 ne plu instrui la mongolan en bazaj lernejoj de la t.n. Interna Mongolio. Temas pri registara kultura rasismo, ĉar lingvo estas bazo de la propra kulturo. K.t.p.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Interna\\_Mongolio#Lingvoj\\_kaj\\_kulturo](https://eo.wikipedia.org/wiki/Interna_Mongolio#Lingvoj_kaj_kulturo)

= =

### 2021-03-11 **Fukushimo - filmo pri la okazintajho je la atomcentrala katastrofo**

Do, tio klare montris la mal-taŭgan konstruadon de la sekureco-sistemo.

Interese: jam 1979 en Harrisburg (Three-Miles-Isnad) okazis la sama teknika problemo.

Arte montras plurajn filmojn pri Fukushima - ankaŭ pri la homoj.

Jen la ligoj en la germana kaj franca versioj:

<https://www.arte.tv/de/videos/047156-000-A/fukushima-chronik-eines-desasters/>

<https://www.arte.tv/fr/videos/047156-000-A/fukushima-chronique-d-un-desastre/>

ili ne rakontis, ĉu la francaj reaktoroj havus la saman problemon.

Sendepende de tia katastrofo estas la aliaj problemoj pri atomreaktoroj - ekde la ekspluatado, kontinua eligo de radioaktivaj izotopoj tra la alta kamentubo, kaj finfine la stokado - krome la kreado de materialo por atombomboj.

Tie estas ankaŭ alia filmo pri la suferantoj de diversaj radioaktivaj poludoj kaj priradiadoj: „La radioaktiva erao“ :

Bikini kaj alia proveksplodoj (japanaj fishistoj, kaj usonaj soldatoj), Tchernobyl (infanoj en Minsk kun malbona sano), infanoj de Fukushima regiono kiu havas tiroidan kanceron, krome ne trovas edzon/edzinon pro la ebla risko por iliaj infanoj. Ili ne parolis pri Semipalatinsk (indas viziti la kunst-kameron en la medicina instituto de Alma Ata, kiu montras strangajn fetojn de priradiitaj bestoj ), ĉina kaj franca eksplodcentroj.

La filmoj estas videblaj longtempe. Aliaj filmoj pri Fukushima ankaŭ en la angla kaj pola.

Preskaŭ je ĉiuj ekzemploj oni raportis ke la registaroj malbone informis la homojn, prefere uzis ilian sorton por ekscii pri la efikoj de la radiado. La lasta ekzemplo estas Fukushima, kie oni for-metas gigantajn kvantojn da poluita grundo kaj kolektas ĉiutage radioaktivan akvon - por „solvi“ la problemon de mankanta stokejo, ellasi tiun radioaktivan akvon en la Pacifikon.

= =

### 2021-03-11 **Peticio pri atomcentralo Krsko en Slovenio**

la peticio postulas ne daŭrigi je pliaj 20 jaroj la uzodaŭron de la atomcentralo Krsko (krshko). Lau plano ĝi devus finiĝi post 40 jaroj en la jaro 2023. La aŭstria CSO Global 2000 kune kune kun organizoj en Slovenio, Kroatio kaj Italio postulas objektivan esploron pri la kvalito de tiu reaktoro. Aparte ĉar ĝi troviĝas en sisme aktiva tereno. Unu Fukushima ja sufichas.

Aŭstrio delonge decidis ne uzi atomenergion.

Ili petas subskribon de peticio - jen la retejo en la germana:

<https://www.global2000.at/stopp-akw-krsko>

--

### 2021-03 **Naturprotekto tutmonda**

Naturprotekto komencas de sube de ĉiu homo, sekvas familio, najbareco, komunmoj, ŝtatoj, UN Jen kelkaj enhavorichaj retligoj al aktivaj grupoj, kie vi povas informiĝi, lerni kaj partopreni:

En la sveda kaj angla: <https://www.naturskyddsforeningen.se/en/about-us>

Amikoj de la Tero - vidu en Vikipedio, kaj ankaŭ jen

en la angla, franca kaj hispana - kun ligoj al alilandaj membroj: <https://www.foei.org/>

--

### 2021-02-21 **Protekti la Nordatlantikan Balenedon** (Gronlanda Baleno)

IFAW.org (internacia fonduso por protekti bestojn) petas subteni peticion al la NOAA (Usona administracio pri oceanoj kaj vetero) kie temas pri pli bona protekto de ĉi-tiu baleno-specio. Entute restis nur ĉ. 360 ekzempleroj, kiuj estas endanĝerigitaj de ŝnuroj de fishistoj kaj de ŝipoj.

Vizitu IFAW.ORG kaj tie vi trovos paghon en via lingvo. - au rekte (germana au franca):

<https://www.ifaw.org/de/projekte/rettung-nordatlantischer-wale-kommt-auch-gemeinden-zugute>

<https://www.ifaw.org/fr/communique-de-presse/journee-internationale-baleine-agir-pour-sauver-baleine-danger-critique-extinction>

= =

2021-02-15 Bill Gates (Microsoft) propagandas atomenergion

Che Terrapower.com temas pri malgrandaj reaktoroj kiuj uzas fanditan salon. Restas pluraj problemoj. Kaj ni ankoraŭ klopodas zorgi pri la radiantan rubajhon - kaj la atombombojn, kiujn eblas konstrui dank' al rikoltota Plutonio.

(informo de <https://hans-josef-fell.de> )

- -

2021-02-08 la nesolidara Luksemburgio

Bedaurinde Luksemburgio apartenas al la oazoj por imposto-shparado ene de EU.

Aparte dum tempo kiam chiu lando bezonas multe da mono por stabiligi & subteni tiujn ekonomiojn kiuj estas trafitaj de la kronviroza pandemio gravas ke almenaŭ enlande la ŝtatoj ricevas impostojn.

Bedaurinde ankaŭ germanaj firmaoj uzas tiun oazon por ŝpari impostojn.

Kompreneble alia afero estas ke Amazon k.s. fraudas impostojn pere shovante la profitojn en aliajn landojn. Ambau estas ne-solidaraj agadoj.

Sven Giegold, MP de la EU Parlamento citis esploron de ĵurnalistoj: [openlux.lu](https://openlux.lu)

Jen lia komento (en la germana, sed ankaŭ en la angla):

<https://sven-giegold.de/openlux-luxemburgs-reaktion/>

--- fino ---